

# Eŭropa Bulteno

Aprilo 2015, Numero 148

## DISKONIGI LA PAĜARON „LINGVO.INFO“

Parayı veren düdüğü çalar. Kiu pagas, fajfas. (Kiu pagas la flutiston, nomas la melodion.)



Mi opinas ke temas pri gravega atingajo: [www.lingvo.info](http://www.lingvo.info). NEPRAS diskonigi tiun informon, ne nur al esperantistoj, sed ĉefe al neesperantistaj medioj. Mi pensas i.a. pri:

- landaj sekcioj de Eŭropa Asocio de la Instruistoj;
- landaj asocioj, kiuj agadas por la pluvivado de lingvoj;
- asocioj de gepatroj de lernantoj;
- instruistoj, ne nur pri lingvoj;
- lernantoj, studentoj kiuj

interesiĝas pri lingvoj;  
- ĵurnaloj (respondeculo pri edukado);

Tamen, kiam oni diskonigas tion al neesperantistaj listoj, mi pensas ke neniel ni menci la vorton “Esperanto”. Mi certas ke pluraj personoj tute ne vizitos la la retejon de [lingvo.info](http://lingvo.info) se ili tuj vidas tiun vorton. Mi diskonigos francan version de la suba teksto el la retejo. Endus traduki tiun informon en diversajn lingvojn sed menciante la retadreson de [lingvo.info](http://lingvo.info) laŭ la uzita lingvo, ekzemple por la franca: <http://lingvo.info/fr>.

Uzebla por diskonigo estas la teksto trovebla ĉe <http://lingvo.info/eo/about>:

„La nova retejo celas provizi informojn pri lingvoj kaj subteni multlingvismon en la interreto por tiuj, kiuj pasie pri lingvoj volas malkaŝi ilian belecon, esprimopovon kaj unikecon. Lingvo.info estas interaga retejo disponebla en ĉ. 20 lingvoj, kaj plej grave, ĝi estas neteda enkonduko al la mondo de lingvoj enrete, kun:

- gramatikaj, leksikaj kaj kulturaj informoj en konkreta lingvo pri ĉiuj 24 oficialaj lingvoj de EU;
- informoj kaj ligiloj, por enprofundi la leganton en la koron de la elektita lingvo, direktante ankaŭ al ekzistantaj retaj kursoj kaj projektoj;
- interesaj, amuzaj kaj ludigaj informoj pri lingvoj ĝenerale.

Estas aparte interese, ke por instruistoj estas je dispono konkretaj lecionplanoj cele al eduko al multlingveco.“

La projekta teamo, konsistanta el naŭ partneroj el sep landoj, estis kreita ĉirkaŭ kvar kernaj partneroj, kiuj regule kunlaboras por subteni multlingvismon en EU kaj starigi senpagajn kaj plurlingvajn retejojn por lerni lingvojn. La kompilantoj ĉiuj rajtas havi senpagajn lingvolernilojn en sia lingvo, ĉar lerni plurajn lingvojn estas necese por kompreni kaj estimi la kulturon kaj heredaĵon de aliaj. En EU estas kreskanta bezono instigi lernadon de lingvoj, de aliaj ol la angla, ĉar la lingvoj pli kaj pli perdas sian pozicion en plej multaj oficialaj eduksistemoj.

Germain Pirlot

## **KVARA PARTO DE SWOT (FLAT)-ANALIZO AVANTAĜOJ KIUJN DONAS LA EKSTERA MONDO**

1. Interreto estas beno por la E-movado. Ĝi ebligas tujan kontaktadon de homoj el iu ajn parto de la mondo kaj forigas la distancojn. Ĝi ebligas ankaŭ komunan lernadon de homoj el diversaj lingvaj medioj. Ĉiuj kiuj iam sopiris renkonti ekstarlandanon por povi paroli kun li en nova lernita lingvo, nun ne plu havas tiun problemon, eksterlandano povas esti tuj laŭdezire en la hejmo.
2. Paca tempo (nemilita) en la plimulto de mondaj ŝtatoj, kiu subtenas pacajn movadojn,
3. Ekzisto de multaj homoj kun socia povo (politikistoj, sciencistoj, gvidantoj de religiaj grupoj, estroj en eduka kampo...) kiuj simpatias kaj pretas subteni E-movadon, se oni adekvate aliras ilin,
4. Moderna teknologio kiu ebligas vastan disvastigon de iu ajn ideo sen havi multan monon – oni povas presi malmultekostajn librojn en tre limigitaj kvantoj, oni povas mem disvastigi ion ajn tra sociaj retoj kaj eĉ ofte en lokaj radioj kaj televidoj sen ion pagi.
5. Ekzisto de Eŭropa Unio kiu estas granda novevoluanta ŝtato kun multaj popoloj sen solvita lingva problemo donas teoriant grandan ŝancon por Esperanto. Preteco de Eŭropaj fondusoj financi projektojn en kiuj ankaŭ E povas havi utilon.
6. Ĉiam pli malmultekostaj vetureblecoj, aparte aviadilaj, donas ŝancon al kiu ajn veturi al kongresoj kaj renkontiĝoj kaj persone amiki kun esperantistoj el multaj landoj,
7. Lernejoj sistemoj iĝis tre elastaj kaj ebligas preskaŭ ĉie havi libervolan partoprenon de infanoj en E-instruado.
8. Ioma fortiĝado de mezriĉa tavolo en pluraj afrikaj kaj aziaj ŝtatoj spronas la movadon en tiuj ŝtatoj (la komenca E-movadon en Eŭropo ĉefe akceptis kaj disvastigis instruistaro kaj juristoj, do meza tavolo)

Zlatko Tišljarić

## PAROLU KAJ LERNU (SPEAK AND LEARN) – NOVA APLIKAĴO ANKAŬ KUN ESPERANTO

[E@I](#) kunlaboras lastatempe pri diversaj edukaj projektoj – unu el ili estas ĵus lanĉita: “[Speak and learn](#)” (Parolu kaj lernu) – aplikaĵo por plurfunkciaj telefonoj kaj tabulkomputiloj. En la lerniga aplikaĵo vi trovos 20 lingvojn, inkluzive Esperanton! La ĉefa ideo de la aplikaĵo estas kolekto de ĉ. 380 gravaj parolturnoj, frazoj, esprimoj, utilaj ĉefe por Erasmus-studentoj. Kompreneble uzi ĝin povas iu ajn por iu ajn celo.



La aplikaĵo estas senpaga, kaj uzebla por ĉiuj tri plej grandaj operaciumaj sistemoj iOS, Android kaj Windows. La aplikaĵo estas ĉefe kreita por uzado en plurfunkciaj (saĝaj) telefonoj, sed eblas ĝin funkciigi ankaŭ en tabulkomputiloj. Avantaĝo de la aplikaĵo estas, ke oni povas elekti lingvojn laŭbezone (kaj ŝanĝadi ilin iam ajn), do la aplikaĵo povas utili kaj lerni Esperanton, sed ankaŭ ajnan de la ceteraj 19

lingvoj. Aldone, estas ĝis nun relative malmultaj aplikaĵoj kun Esperanto, do des pli bonas, kiam nia lingvo aperas en tia ĉi pli granda projekto, kiu inkluzivas jam tuj 20 lingvojn.

### Ideo malantaŭ la projekto

Moviĝemo de junuloj pligrandiĝas danke al la programo Erasmus+. Tre ofte okazas, ke studentoj malfacile adaptiĝas al nova lando ĉar ili ne scipovas la lokan lingvon, kaj pro la komunikproblemoj aperantaj pro tio, ke la angla, germana aŭ franca, kutime instruataj kiel dua lingvo en lernejoj, ne estas parolataj de ĉiuj homoj en EU-landoj.

### Nia celo

Estas tre utile havi bazan scion de la lingvo de la lando, al kiu la partoprenanto veturas. Koni la ĉefajn elparolregulojn kaj la plej tipajn frazojn bezonatajn en ĉiutaga komunikado jam multe helpas. La projekto kreis plurlingvan interagan aŭd-vidan produkton por lerni lingvojn: “Speak and Learn”. La produkto ebligas al lernanto lerni bazajn frazojn en konkretaj lingvoj, en niveloj A1 kaj A2.

### Nia ideo

La produkto ne bezonas daŭran konekton al la Interreto, la uzanto ĉiam havos la aparaton kun si (tamen tio signifas, ke vi bezonas ĉ. 260 MB da libera spaco en via telefono). La planata rezulto estas helpi al junuloj adaptiĝi al la lando, al kiu ili veturas danke al la programo Erasmus+. Tiu ĉi projekto estas financata per subteno de la Eŭropa Komisiono.

Tiuj ĉi 20 lingvoj aperas en la aplikaĵo: English, Français, Deutsch, Nederlands, Português, Español, Magyar, Latviešu, Romanian, Italiano, Lietuvių, Türkçe, Eesti, Slovenčina, Ελληνικά, Slovenščina, Български, Русский, Čeština, Esperanto

Petro Baláž

## UNUA ŜERCO-RETEJO EN ESPERANTO LANĈITA

La organizo E@I ĵus lanĉis novan retejon: Ridejo (<http://ridejo.ikso.net>), retejo por ŝercoj en Esperanto. Humuraj retejoj estas multegaj en aliaj lingvoj, sed ĝis nun mankis simila en Esperanto. Tial E@I venas kun la verdlingva retejo, por humurigi kaj amuzigi Esperantistojn. La funkciado estas simpla kaj simila al tiu, kiun oni trovas en multaj tiaj retejoj: ŝercoj kaj amuzaj bildoj estas ordigitaj laŭ pluraj kategorioj, kaj legantoj povas proponi ŝercojn (viaj aldonoj estas tre bonvenaj!), voĉdoni por la plej amuzaj kaj diskonigi ilin en sociaj retoj.



La retejon, kiu estis delonge planata, fine realigis Matthieu Desplantes (nova ĉi-jara dungito de E@I), kiu pasintjare programis ankaŭ la projekton « Bonan Apetiton » (<http://apetito.ikso.net>) – retejon pri la veganaj kaj vegetaraj receptoj en Esperanto.

La logotipo de la nova retejo estas verko de la nova voluntulino de E@I Jelena Ĥusanova el Rusio.

La retejo nun enhavas nur malmultajn ŝercojn, la ideo estas krei platformon, kien Esperantistoj mem kontribuu kaj aldonadu la ŝercojn. Kiel diras kunordiganto de E@I Peter Baláž: « La ŝercoj estas foje tikla afero, ili kapablas foje kolerigi aŭ ofendi homojn, sed ni esperas, ke nian retejon homoj vizitados ĉefe por amuziĝi. Ankaŭ humuron oni devas trakti kun humuro). Celo de la retejo ne estas iun konkretan humiligi, sed disponigi platformon, kie ni povas ĉiuj alŝuti niajn ŝatatajn ŝercojn kaj kundividi ilin kun aliaj E-istoj de la mondo. » Vi ĉiuj do estas bonvenaj kontribui al la historie unua reta kolekto de ŝercoj en Esperanto!

E@I-teamo

## BRITA ESPERANTO-KONGRESO 2015

La 96-a Brita kongreso de Esperanto okazis ĉi-jare en Brighton, fama somerumurbo sur la suda bordo de Britio (por esperantistoj la loko asociiĝas unuavice kun la UK okazinta tie). La kongreso iom diferenciĝis per tio ke EAB en nunaj ŝanĝiĝintaj cirkonstancoj okazigis la eventon sen LKK.



La ĉefpreleganto estis Jorge Camacho el Hispanio. Liajn prelegojn karakterizis lia vido de la mondo tra kamaĉo-poezio. La plej malproksima gasto estis el Sud-Koreio. Malgraŭ tio ke dum la lastaj jaroj nombro de partoprenantoj de Britaj Kongresoj estas relative malgranda (duoncento en Brighton), la kongreso daŭre ludas gravan rolon kiel "realmonda" (neinterreta) rekta kontakto interhoma. En situacio kiam mankas lokaj fortaj regionaj organizaĵoj kiuj kiel

LKK organizu la eventon, kiam asocio mem devas okazigi sian kongreson, iuj asociaj oficuloj preferus okupi sin pri aliaj novaj aferoj anstataŭ organizi kongresojn. Tiu ĉi dilemo nepre bezonas profundan pripensadon kun analizo de preferindoj (ĉu daŭrigi per la tradicioj aŭ riski anstataŭigi ilin per io alia (eble alicela))?



La enkongreseja servo bonis per laboro de plentempe dungita profesia sekretario de EAB (feliĉe/bonŝance la "riĉa" asocio povas pagi salajron al la oficuloj sen kiuj la afero "endormiĝus"). La partoprenintoj tamen kontentis. Ĝis kiam vivas esperantistoj, Esperanto certe ne mortas. Sendepende de tio ĉu la kongresoj estos daŭrigataj tradiciaj (estas farita propono okazigi la sekvan en Liverpool) aŭ nur

unutagaj anglalingvaj laborkunsidoj de EAB (estis sugestita tio por 2016 en Londono), la Brighton-a kongreso, jam la 96-a, restas en nia historio kiel memorinda.

Peeter Aitai

## KVAR KATALUNOJ EN 8-A MEZORIENTA RENKONTIĜO EN TUNIZIO

De la 28a de marto ĝis la 1a de aprilo okazis en la internacia kulturcentro de Hammamet (Tunizio), la 8a Mezorianta kaj Nordafrika Esperanto-Kunveno. Ĉi-jare, kelkajn tagojn antaŭ la aranĝo, okazis atencoj en la ĉefurbo de la lando, sed ankaŭ okazis la Monda Socia Forumo. Tial, krom la interkultura dialogo, kiu normale karakterizas tiun eventon, elstaris la internacia solidaro al la tunizia popolo. Rimarkindas, ke pluraj aliĝintoj ne povis finfine partopreni, ĉar pluraj aviadilflugoj estis nuligitaj. Tio, ekzemple, okazis al deksesoj da polaj aliĝintoj.



Subtenis la aranĝon Asocio de Amikoj de la Medino de Hammamaet kaj en ĝi partoprenis ankaŭ grupo de kvar katalunoj, nome Gemma, Mauro, Saioa kaj Xavi. Ni prezentis, i.a. prelegon pri la rilato inter lingva justeco kaj militoj. La renkontiĝon kompletigis sinsekvo da vizitoj al la Muzeo de la Bardo — mondfama pro ties

kolekto de mozaikoj, kaj al la antikva urbo Cartago, al la urbeto Sidi Bu-Saido kaj al la urbo Kajruano, la unua islama urbo de Magribo. Venontjare, la 9a Mezorianta Kunveno okazos en Turkio, en la regiono Kapadokio.

Xavier Alcalde

## DĴ BRUSELO ELEKTIS ESPERANTAN NOMON



"Esperanto estas miksaĵo de lingvoj" klarigas la DĴ Bruselo en video sur YouTube\*. Kiel albandevana loĝanto de Bruselo li estas sufiĉe konata diskjokea-artisto en Bruselo kaj Flandrio. En tiu video li klarigas (angle) pri la elekto de la esperantlingva nomo « Bruselo » : «Ne nur pro mia rilato al Bruselo (ĉefurbo de Belgio), sed ankaŭ pro la diverseco de muziko en la mondo» . Li opinias ke nuntempe dominas en la mondo komerca muziko. «Tiom da muziko en la mondo ekzistas kaj restas nekonata» laŭ li. Tial li volas konigi al la publiko aliajn muzikojn ol nur la klasikajn ĝenrojn. Lia muziko enhavus kaŝitajn sociajn kaj politikajn mesaĝojn. «Pere de tia muziko mi povas atingi homojn alimaniere, tion vi povas vidi», li diris.

Spektu la filmeton sur <https://www.youtube.com/watch?v=FC5IU8iL8Ac>

Sub lia vera nomo Bleri Lleshi li estas ankaŭ filozofo, politika sciencisto, dokumenta filmisto kaj verkisto de libroj rilate al identeco kaj interkultureco. Li pledas por diverseco, plureco de kulturoj: konservi kaj samtempe fortigi la plej bonan el ĉiuj kulturoj. La mondo rapide ŝanĝiĝas kaj same kulturo. Kultura ŝanĝiĝado baziĝu sur interŝanĝo, renkontiĝo, dialogo, rekono kaj aprezo de divesecoj. Por tio ni bezonas malfermecon de la menso kiu implicas la ĉirkaŭbrakumadon de inspiroj kiuj devenas de diversaj konvinkoj.

Herman Deceuninck

## **EKZEMPLO KIEL AGU ESPERANTISTOJ KUNLABORE KUN ALTRANGA POLITIKISTO**

### **NIKOLA ŜEGOTA (memore al 30-jariĝo de la morto)**

Komence de decembro 1981 delegitaro de Kroatia Esperanto-Ligo kaj Internacia Kultura Servo (J. Brkanac, E. Bečić, J. Rey kaj mi) vizitis en la parlamento de Kroatio ties vicprezidanton Nikola Ŝegota t.e. la prezidanton de unu el la parlamentaj ĉambroj (Soci-politika konsilio) kun la peto fariĝi en la nova mandato (ekde printempo 1982) prezidanto de Kroatia Esperanto-Ligo (KEL). Ni sciis, ke li lernis Esperanton antaŭ la dua mondmilito kaj plurfoje montris simpatian al nia movado. Ankaŭ en tiu interparolo li esprimis sian deziron helpi al la Ligo, sed li ne akceptis fariĝi membro de la prezidantaro de KEL. Li nur petis, ke ni liveru al li skriban planon por la estonta evoluo kun mencio de la ĉefaj problemoj, kiuj nin turmentas. Nur kelkajn tagojn pli poste li venis al la libroprezento »Moderna kroata poezio« en Esperanto, kie anstataŭ la planitaj 15 minutoj li restis preskaŭ du horojn. Ni en IKS preparis la petitan materialon kaj sendis ĝin al Nikola Ŝegota. Kelkajn tagojn pli poste li anoncis sian viziton al niaj ejoj. En la interparolo pri problemoj, deziroj kaj planoj ni prezentis al li la deziron, ke oni petu pri speciala ekspres-loterio, kies profito irus al KEL pro la preparoj de la 100-jariĝo de Esperanto. Fine de januaro 1982 okazis en Zagrebo internacia simpozio pri ŝparoj, kiuj estus atingeblaj en internaciaj kontaktoj per uzo de Esperanto, en kiu partoprenis ankaŭ la tiama vicprezidanto de UEA d-ro Renato Corsetti. Lin la Respublika Komitato de Socialisma Unuiĝo invitis al vespermanĝo. Ĉeestis Marinko Grujić, direktoro de Vjesnik, Damir Sinković, nome de la invitanto kaj Nikola Ŝegota nome de la parlamento. Ŝajnas, ke la interparolo dum tiu vespero influis al lia posta definitiva decido akcepti kandidatiĝi kiel prezidanto de KEL.

Kelkajn tagojn pli poste li invitis nin al interparolo en Sekretariato por Financoj de Kroatio, en kiu ni diskutis pri peto rilate la loterion. Ĉeestis ĉefo de la Sekretariato de la Financministerio, Nikola Ŝegota, Josip Brkanac kaj mi kaj ni transdonis la oficialan peton. Jam en marto la peto estis pozitive akceptita kaj tiam oni sciis, ke speciala ekspres-loterio kun reklamo de Esperanto (mencianta ĝian 100-jariĝon) estos vendata en la dua duono de la sama jaro kaj ke post ties disvendo fine de la jaro KEL disponos pri mono por la 100-jariĝo. En aprilo Nikola Ŝegota estis dum la jarkunveno elektita nova prezidanto de KEL.

Kvankam la teman kunsidon pri la estonta laboro de KEL en Kunordiga komitato de Socialisma Unuiĝo por sociaj organizaĵoj kaj societoj preparis la pli frua KEL-prezidantaro, por la subteno al tiu laborplano aktive agis Ŝegota dum la kunsido en februaro 1982. Kontaktado kun tiu Komitato estis intensa dum la tuta jaro, ĉar surbaze de la nova Leĝo pri

societoj kaj sociaj organizaĵoj tiu ĉi komitato faris decidojn pri tio, kiu ricevos la statuson de socia organizaĵo. Pozitivan opinion pri KEL akceptis la Komitato en la kunveno okazinta la 26-an de novembro 1982 post multaj klopodoj de Nikola Ŝegota, ĉar la prezidantino de la Komitato Ŝtefa Ŝpiljak kontraŭis tion kaj la decido en la antaŭa kunveno estis prokrastita. Samjare Ŝegota startigis plurajn aliajn iniciatojn, inter kiuj estis ankaŭ diskuto pri la laborplano de KEL en Kulturkomisiono de respublikaj sindikatoj. Post lia enkonduka parolo oni tie akceptis tre pozitivajn konkludojn. Tio estis komenco de posta abunda kunlaboro kun la sindikato, ĉefe kun la sindikata gazeto »Radničke novine«. Dum tiu tuta tempo Nikola Ŝegota ne nur aktive gvidis KELon, havis multajn diversajn kontaktojn, sed ankaŭ vizitis plurajn Esperanto-societojn ekster Zagrebo. Li kontaktis esperantistojn de Split, partoprenis en seminario por junaj aktivuloj de KEL proksime de Bjelovar, veturis al Rijeka por viziti vilaon Amforo. Li iniciatis ankaŭ kunsidon en la Universitata Biblioteko por interparoli pri la heredaĵo de Marinko Gjivoje.

Kvankam emeritigita en majo 1982, Ŝegota restis tre aktiva en multnombraj soci-politikaj organizaĵoj kaj organoj interalie ankaŭ kiel prezidanto de Asembleo de Loterio kaj hazardludoj. Li estis tre engaĝita en la preparoj de nova Leĝo pri loterio kaj hazardludoj, kiu estis definitive akceptita en 1983. En ĝi troviĝis ebleco, ke ankaŭ KEL fariĝu konstanta utiliganto de la mono el la profitoj de la Loterio, kio antaŭe ne estis ebla. Nikola Ŝegota sukcesis enmeti en la leĝon paragrafon pri financado, kiu antaŭe ampleksis nur sportajn kaj humanismajn organizojn, ankaŭ sociajn junularajn organizojn, laŭ lia ĉiam ekzistanta kompreno, ke necesas maksimume helpi la junularon. Pri tiu grupo de monutiligantoj (junularaj soci-gravaj organizoj) la kunordigadon pri financado faros Kunordiga komitato de sociaj organizaĵoj, membroj de Junulara Asocio de Kroatio, en kiu membri interalie ankaŭ KEL. La Leĝo enhavis ankoraŭ unu novaĵon. Laŭ la antaŭa leĝo oni financis nur tutrespublikajn organizojn, laŭ la nova 70% de la planita mono iris al lokaj societoj rekte kaj 30 % al la respublikaj, tiel estis malfermita la ebleco ke ankaŭ lokaj societoj estu rekte financataj. Komence de 1983 Ŝegota kontaktis la prezidantaron de la tiama plej amasa soci-politika organizaĵo: Socialisma Unuiĝo, Darinka Puškarić, kiu akceptis la delegitaron de KEL gvidatan de Ŝegota en februaro 1983. Ankaŭ ĉi tie oni subtenis la laboron de KEL kaj la planon tre solene celebri la 100-jariĝon de Esperanto. Oni decidis peti akcepton ĉe la Jugoslavia prezidanto de Socialisma Unuiĝo. La delegacion de Jugoslavia E-Ligo akceptis la prezidanto Marin Cetinić en Beograd la 21-an de aprilo 1983. Nomo de KEL ĉeestis Ŝegota kaj mi. Dum tiu ĉi kunveno oni ricevis gravajn informojn por la estontaj paŝoj kaj la rajton delegi sian delegiton en Federacian konferencon de tiu organizaĵo. Tiu delegito poste fariĝis Nikola Ŝegota por la periodo 83-87. Je iniciato de Ŝegota okazis ankaŭ kelkaj kunvenoj en Eduka konsilio de Kroatio, pro kio tiu ĉi institucio en februaro 1983 subtenis la peton de KEL enkonduki Esperanton kiel liberan aktivecon en elementajn kaj mezajn lernejojn de Kroatio. En marto samjare startis la rubriko »Esperanto« en Radničke novine je duona paĝo, kiun redaktis Judita Rey dum plenaj du jaroj. Dum la jarkunveno de KEL en aprilo 1983 en Karlovac Ŝegota estis reelektita la duan fojon por esti prezidanto. La nova loteria leĝo ebligis al KEL ricevi jam en 1983 financajn rimedojn de 3.000.000 da dinaroj kaj oni iniciatis la rekonstruadon de malnova kastelo Lukavec, kiu laŭplane estus devinta fariĝi internacia junulara Esperanto-centro. Dum la jaro 1983 realiĝis signifa salto ankaŭ je la plano de instrumentado de Esperanto. IKS realigis grandan eksperimenton de rapida lernado de Esperanto dum unu semajnfino por 300 volontuloj. Tio ebligis novan evolulinon de la Zagreba instrumentado kaj pli rapidan edukadon de E-instruistoj. La mono ricevita en tiu jaro estis grandparte investita por tiu eksperimento, por adapto de la nova lernolibro kaj seminarioj por novaj instruistoj de Esperanto en Zagrebo kaj ties ĉirkaŭaĵo. La Zagreba instrumentado rapidege ekdisvastiĝis. Oni realigis kontaktojn kun Aŭstrio, Hungario kaj Italio, kiuj same



aperigis lernolibrojn laŭ la Zagreba Metodo. La svisa verkisto Claude Piron skribis scenaron de speciala bildstrio por la metodo kaj poemojn.

Sed en 1983 oni malkovris nekuraceblan malsanon de Nikola Ŝegota (kancero). Kvankam li sentis, ke io ne estas en ordo, li ne iris al kuracisto antaŭ grava kunveno de la Asembleo de Loterio kaj hazardludoj en junio 1983, post kio li devis iri al la hospitalo. Malgraŭ la malsano (alternis periodoj de hospitala kaj hejma kuracado) li daŭre aktivadis. Dum tiu tempo li lernis Esperanton, kunlaboris en la rubriko Esperanto de »Radničke novine«, kie li eĉ publikigis sian tradukon de iu artikolo el la ĉina revuo »El Po pola Ĉinio«, li skribis artikolojn por »Tempo« kaj aliajn.

En 1984 li forte engaĝiĝis je la realigo de la planoj de KEL. Ekde la jarkunveno okazinta en Kutina en aprilo 1984 li ne plu estis prezidanto (tiutempe validis la statuto, laŭ kiu neniu povis esti elektita pli ol 2 foje por la funkcio de prezidanto) kaj li estis elektita prezidanto de la Komitato por preparo de 100-jariĝo de Esperanto. Tiusence li kontaktis televidon Zagreb (kunsido kun direktoro) kaj kun la preparokomitato de la Zagreba Universiado (kunsido kun Drago Flego). Jam tre malsana li venis al kunsidoj de la prezidantaro de KEL kaj al la kunsido de la Komitato por centjariĝo de Esperanto. Tiujare IKS iniciatis ankaŭ la starton de revuo »Ovo«, amuza kaj sprita revuo en simpla Esperanto. En momentoj de duboj kaj dilemoj Ŝegota plene subtenis la iniciaton, ĉar li kredis je kapablo de junaj homoj kaj ilia entuziasmo. Kaj la revuo naskiĝis. Li plene subtenis la klopodojn de KEL en tiu jaro por realigi la unuan parton de la plano pri fondo de Internacia Junulara E-centro en Lukavec kaj fine de tiu jaro oni aprobis la unuajn financajn rimedojn por tiu celo (1.800.000 dinaroj por ellabori projektan dokumentaron). Jam en tre malbona stato en junio 1984 li decidis persone iri al la kastelo por vidi ties staton kaj post tio li estis ankoraŭ pli konvinkita, ke indas agadi por tiu celo. La kastelo estis en malbona stato kaj necesis multaj klopodoj kaj mono por rekonstrui kaj funkciigi ĝin (kio bedaŭrinde poste ne realiĝis). Baldaŭ poste li subtenis la kroatajn esperantistojn inviti Internacian Junularan Kongreson en Zagrebo. »Necesas fari ĉion, por ke tiu kandidatiĝo sukcesu kaj ke oni vere ricevu la kongreson« estas liaj vortoj dum la kunveno de la Komitato por la 100-jariĝo de Esperanto.

Apartan zorgon Nikola Ŝegota dediĉadis al la institucio Internacia Kultura Servo, kies direktoro mi estis, kiu kiel serventreveno de KEL ĉiam rapide kaj efike plenumis ĉiun taskon de li ricevitan. Li helpis por ke IKS ricevu ejojn en Velika Gorica kaj venis persone rigardi ties konstruadon. Ofte li substrekadis, ke IKS estas juna kaj tre elanplena kolektivo kapabla realigi grandajn taskojn.

Li subtenis ankaŭ Esperanto-societon en Rijeka solvi la malfacilaĵojn rilate la lastajn elpagojn por la aĉetita vilao Amfora kaj aprobis prunton el la mono, kiun KEL ricevis de la Loterio.

La lastan personan kontakton kun li mi havis kelkajn tagojn antaŭ la nova jaro en decembro 1984. Kvankam jam tute elĉerpita, li interparolis kun mi en sia loĝejo preskaŭ du horojn. Li parolis pri planoj kaj donis utilajn konsilojn. Lia baza mesaĝo dum tiu lasta renkonto estis: »Restu je la sama direkto de via evoluo, je kiu vi estis ĝis nun. Ne estas necese enkonduki funkcion de profesia sekretario de KEL. IKS devas ankaŭ plue esti motoro kaj realiganto de la planoj de KEL. Daŭrigu realigadi la iniciatojn kiaj Lukavec kaj »Ovo«.

En la tago de lia morto la 31-an de januaro 1985 okazis kunsido de Komisiono por sociaj organizaĵoj kaj societoj ĉe la Junulara Asocio de Kroatio dediĉita al financado en 1985-a jaro.

Tie mi aŭdis, ke dum la kunsido de la Prezidantaro de Loterio kaj hazardludoj antaŭ kelkaj tagoj oni traktis ankoraŭ tri skribajn proponojn de Nikola Ŝegota. Foririnte en hospitalon, el kiu li ne plu revenis, li kunportis aktujon kun amaso da dokumentoj por povi labori »kiam iom malplifortiĝos la doloroj«.

Laborante ĝis la lasta tago de sia vivo Ŝegota lasis neforviŝeblan spuron en la historio de kroatia Esperanto-movado kaj pli larĝe, ĉar la internaciaj iniciatoj kiel revuo Ovo, manifestaĵo »100 jaroj de Esperanto-kulturo 1987« kaj IJK en 1988 en Zagrebo, Zagreba Instrumetodo, kontaktoj kun ĉina Esperanto-Ligo restos gravaj ankaŭ en la internacia Esperanto-historio.

La agado de Ŝegota ebligis abundan regulan financadon de KEL kaj IKS ĝis la milita jaro 1991, kio kaŭzis, ke speciale la junulara E-movado en Kroatio daŭre fortiĝadis kaj same pluraj iniciatoj de IKS inkluzive de PIF. Pinto de tiu periodo estis la jaroj 1987 kaj 1988 kiam en Zagrebo okazis manifestaĵoj «100 jaroj de E-kulturo» (87) kaj Internacia Junulara Kongreso (88). En tiuj jaroj ĉiumonate okazis novaj E-kursoj, la ĝeneralaj publikrimedoj disponigis neimageble multan spacon al Esperanto (dum du jaroj la ĉefa tagĵurnalo Večernji list havis semajnan rubrikon »Esperanto«, dum la IJK tri zagrebaj ŝtataj radio-stacioj havis ĉiutagajn rubrikojn pri Esperanto kaj la kongreso), televido daŭre elsendis raportaĵojn pri Esperanto kaj la pinta aranĝo estis la plej populara tiutempa elsendo de kvizo kies unu elsendo estis dediĉita al Esperanto. Tial Zagrebo ankoraŭ nuntempe estas la urbo, kiu havas grandan kvanton da gejunuloj kun bona scio de Esperanto kaj aktiva agado en la tutmonda E-movado.

La agado de Ŝegota estas efektive la nura ekzemplo en la E-historio, kiel devas procedi politikisto, se li volas verajn penetraĵojn de Esperanto en socio. Kaj kiel devas esperantistoj kunagi kun li kaj efektiviĝi liajn ideojn. Studi liajn agpaŝojn povas esti ege utila por sugestoj al politikistoj kiuj sincere volus fari ion por Esperanto, kiel agi.

Zlatko Tišljarić

## LA NUNA FAZO DE ANGLALINGVA IMPERIISMO



Mi estas timoplena rilate al la la mortigo de la itala lingvo favore al la angla. Tion mi tiel timas, ke dum kvindek tagoj mi rezignis pri manĝado kaj mi sidadis en aŭtomobilo antaŭ la itala ministerio pri edukado por konvinki la ministrinon al forigo de la malpermeso de instruado en la itala lingvo ĉe la teknika universitato de Milano kaj al ĉeso de la lingvopolitiko, laŭ kiu oni ne plu instruas en nia lingvo kelkajn fakojn, ilin donacante al la angla lingvo, kun sekva reduktado de nia kulturo kaj de nia

eldona industrio.

Mi tion faras por doni al vi elementojn por ke vi pli bone konsciis pri tiu fenomeno, kiu estas difinita ankaŭ teorie per ŝanĝo de imperiismo, kiu de koncepto simple teritoria (geografia) iĝas alteritoria en senco mensa, kun la akiro de mensa teritorio: “la imperioj de la estonteco estas la imperioj de la mensa”, klare asertis en Harvard Winston Churchill. Memkompreneble la anglalingva imperio de la mensa intencas konkeri la lingvon, la lingvon de la popoloj, kies

gepatra lingvo ne estas la angla. Pri tiu vera angla-usona milito kontraŭ la mondo ne angle-parolanta ni havas precizajn informojn ekde ĝia planado; tio komenciĝis en 1943, kiam Churchill kaj Roosevelt kune akordiĝis por ĝin iniciati - tiutempe per Basic english, poste ili rimarkis, ke tio ne estas necesa kun tiu pravigo: “superregi la lingvon de iu popolo donas multe pli da profito ol depreni de ĝi teritoriojn aŭ ekspluati ĝiajn riĉaĵojn” (Winston Churchill, universitato de Harvard, 6-a de septembro 1943).

La itala reĝimo, kontrolita kaj kontrolata de politikaj partioj, tion plenkonscie akceptis, portante la italan popolon en la kulturan angla-usonan merkaton, malriĉigante tiun italan (kaj eŭropan. Cetere jam je la komenco de la 30-aj jaroj alia usona prezidento, Clark Hoover, ne hezitis aserti: “Tie, kie penetras la usonaj filmoj, vendiĝas pli multe da usonaj aŭtomobiloj, ĉapeloj, gramofonoj”. Fakte, hodiaŭ la italaj televidstacioj el cent filmoj dissendataj en la vesperaj horoj dissendas 70 usonajn, 18 italajn, 12 el ĉiuj aliaj landoj kune.

Fakte la eŭropa kontinento devas kontraŭstari atakon mortigan por sia kultura libero. En la milito por la lingvoj ne gravas la teritorio, sed la mensa kapablo. Poste, la politiko devos adaptiĝi. Ni estu klaraj: se en Italujo oni ne plu parolas itale, la itala nacio ne plu ekzistas (Per la itala lingvo kion vi faru? Lerni la italan lingvon utilas al nenio. Ĝi estas lingvo sen ŝanco. Por trovi postenojn lernu la anglan) .

Al la angla lingvo voranta la aliajn lingvojn, jam la 20-an de decembro 2001 revuo “Economist” dediĉis longan artikolon, kies titolo estis “La triumfo de la angla lingvo: imperio per aliaj rimedoj”. La 10-an de marto 2002 revuo “Independent denuncis: ”Lingvo-ekstermo: la morto de la lingvoj. Ĉiun duan semajnon mortas unu”. La brita lingvisto David Crystal kaj la kanada Krauss antaŭvidis, ke pli ol 90% de la lingvoj ekzistantaj formortos antaŭ la fino de la jarcento. UNESKO, en sia *Atlaso de la lingvoj estingiĝontaj en la tuta mondo*” (publikigita en la itala lingvo de mia osocio), estis iom pli prudenta: nur 50%, el kiu 160 eŭropaj. Paradokse, tiu denunco naskiĝas en anglalingva medio. Evidente, niaj intelektuloj ignoras, aŭ volas ignori, la problemon.

La koloniigo de la konscioj de la regatoj pasas tra tri fazoj:

1. EKZALTO de la reganta/majoritata grupo (ni ĝin nomu Grupo A): de ĝia lingvo, kulturo, leĝaro, tradicio, politika sistemo, evoluo, atento al homaj rajtoj ktp.
2. MALPLIVALORIGO de la minoritataj/regataj grupoj (ni ilin nomu Grupo B): de iliaj lingvoj, kulturoj, leĝaroj, tradicioj, politikaj aranĝoj, evoluo, atento al homaj rajtoj ktp.
3. RACIIGO de la rilatoj inter la du grupoj en senco ekonomia, politika, sociologia, lingva ktp, tiel ke grupo A estu akceptata kiel funkcie utila al grupo B, ĉar ĝi “Helpas”, “civilizas”, “modernigas”, instruas demokration”, “garantias la rajtojn”, “forigas la konfliktojn”, “pacigas la mondon” ktp.

Iu, mistifike, asertas, ke “la angla lingvo estas nenies propraĵo”, kaj ne detruas aliajn lingvojn (ekzemple, prof. Tullio De Mauro en radio dissendo pri “Eŭropa Unio, kia politika Unio?” de la 30-a de januaro 2015. Kontraŭ tio mi argumentas:

- Eĉ se ekzistus ia “angla lingvo por internaciaj rilatoj”, la neanglalingvuloj devus elspezi nenion por ĝin lerni, kaj tio signifas egan monfluan de la neanglalingvaj landoj al la anglalingvaj.
- La denaskaj anglalingvuloj (kaj la koncernaj ŝtatoj) estus la solaj decidrajtaj pri la “bona kvalito” de la lingvo uzata.

Ni ne iluziiĝu, nek iluziu; la angla lingvo ne estas ĉies propraĵo! Ĝi iĝus tia se ĉiuj aliaj rezignus je la propra lingvo denaske, kaj sekve ĉiuj aliaj lingvoj malaperus spontane. Koncerne Eŭropon, adopto de tia angla lingvo ne lasus egalan oportunon al ĉiuj civitanoj. Konklude:

1. La anglalingvuloj kaj la anglalingvaj landoj ĝuus egan avantaĝon en la instruado de sia lingvo, en interpretado, en redaktado kaj traduko de dokumentoj
2. La anglalingvuloj ne pagus por tradukoj.
3. La anglalingvuloj povus dediĉi la ŝparitajn rimedojn por aliaj celoj, konkurencante kun la aliaj en pli favoraj kondiĉoj.
4. La neanglalingvuloj dediĉintaj tempon kaj monon al lernado de la angla lingvo neniam estus sur la sama nivelo de la denaskuloj:
  - en kompreno
  - en publika debato
  - en negocado

Al tio aldoniĝu diskriminacio en dungado inter eŭropaj civitanoj anglalingve denaskaj kaj nendenaskaj. Estas centoj la anoncoj por dungo petantaj *English mother tongue* (la angla kiel gepatra lingvo) aŭ *English native speakers* denaske anglalingva); konsekvence europaj civitanoj bonege konantaj la anglan lingvon ne estas dungotaj.

Jen do lingva subpremo kontraŭ Italujo kaj aliaj landoj, sen kontraŭstaro de la reĝimaj partioj kaj publika opinio. Ni imagu mapon de Italujo simulanta militon kaj prezentanta universitatojn kaj aliajn lernejojn, kaj ni metu sur ilin (pli realece) usonan flageton, kiam ilin konkeras la angla-usona lingvo. Ni sekvu la evoluon ekde 2001 (registaro Berlusconi-Moratti, la angla lingvo akiras monopole la rangon de unua fremda lingvo en la lernejoj) tra registaro Berlusconi-Gelmini ĝis la nuna Renzi-Giannini, almenaŭ unu fako, iam instruata en la itala lingvo, estu devige instruata en la angla eĉ en la elementa lernejo, kaj en la Teknika Universitato de Milano estu malpermesita la instruado per la itala lingvo: en malpli ol 15 jaroj la usonaj flagoj kovras la tutan landon. Kiom da italaj junuloj estas militkaptitaj, sen libero de elekto?

En la Teknika Universitato de Milano restis 6 kursoj (el 39) en la itala lingvo: 40 mil militkaptitoj dum 5 jaroj nur en Milano. En tuta Italujo 9 milionoj da personoj lernos nur en la angla lingvo almenaŭ unu fakon ekde la aĝo de tri jaroj. La nuna ministro pri Defendo, Pinotti, komencis kampanjon por rekrutigo nur en angla lingvo: eĉ la defendo estos lingve okupita.

Giorgio Pagano  
Sekretario de Radikala Esperanto-Asocio

**Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**

**Finredaktita: la 30-an de aprilo 2015**

**Redaktoro:** Zlatko Tišljär

**En la numero kunlaboris:** Germain Pirlot, Zlatko Tišljär, Petro Balaž, Peeter Aitai, Xavier Alcalde , Herman Deceuninck, Giorgio Pagano

**Kontakto:** [ztisljar@gmail.com](mailto:ztisljar@gmail.com)

**Retpaĝo:** <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

